TEJO-aktuale estas retpoŝta informilo de TEJO.
2016-09-03 n-ro 427

TEJO-aktuale revenas el kongresosezona paŭzo! Ni pardonpetas pro la malfruo. Nepre restu fidela al TEJO-aktuale por ricevi la plej koncizajn novaĵojn en via leterkesto.

## Forpasis Reinhard Selten (1930-2016)

La 23-an de aŭgusto Esperantujo perdis sian plej eminentan scienciston per la forpaso de prof. d-ro Reinhard Selten, naskiĝinta la 5-an de oktobro 1930. En 1961 li doktoriĝis pri matematiko en la Goethe-Universitato de Frankfurto-ĉe-Majno, kie en 1968 li akiris docentan diplomon. En la studjaro 1967-1968 li estis gastprofesoro en la Universitato de Kalifornio en Berkeley. Li estis profesoro en la Libera Universitato de Berlino 1969-1972, en la Universitato de Bielefeld 1972-1984 kaj ekde 1984 en la Universitato de Bonn. De 2006 ĝis 2014 li gvidis esplorprojekton pri eksperimenta ekonomiko de la Nordrejna-Vestfalia Akademio de Sciencoj kaj Artoj. Dek unu universitatoj asignis al li honoran doktorecon.

En oktobro 1994 Selten fariĝis, kun du usonaj ekonomikistoj, laŭreato de la Nobel-premio pri ekonomiko pro sia elstara kontribuo al la ludoteorio. Krom pri ludoteorio, Selten faris pioniran esploradon pri eksperimenta ekonomiko kaj pri limigita racieco. En lia ampleksa scienca bibliografio, ĉefe en la germana kaj angla, troviĝas ankaŭ la verko *Ĉu mi lernu Esperanton? Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj* (1982; 2-a eld. 1995), kunaŭtorita kun Jonathan Pool.

Legu la tutan nekrologon en Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 634 (2016-09-01).

---

## Forpasis Detlev Blanke (1941-2016)

D-ro Detlev Blanke, unu el la plej renomaj nuntempaj lingvistoj, forpasis la 20-an de aŭgusto en Berlino. Naskiĝinta la 30-an de majo 1941, Blanke lernis Esperanton memstare en 1957. Li doktoriĝis en 1976 per disertacio pri kompara vortfarado de Esperanto kaj la germana (Plansprache und Nationalsprache), kaj akiris docentan diplomon en 1985 per disertacio pri planlingvoj (Internationale Plansprachen). En 1988 li fariĝis docento pri interlingvistiko en la Berlina Humboldt-Universitato, kie li daŭre prelegis ĝis 2007. Tra sia aktivado en la Esperanto-movado, Blanke transprenis sennombrajn postenojn. Interalie, Blanke estis sekretario de Centra Laborrondo Esperanto en la Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko 1968-1980 kaj ekde 1981 de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, kiu en 1991 unuiĝis kun Germana Esperanto-Asocio. Plie, la Esperantologiaj Konferencoj, kiuj okazas en ĉiu UK ekde 1978, dankiĝas al iniciato de Blanke. Li estis ege fekunda aŭturo kaj redaktoro: La bibliografio de la publikaĵoj de Blanke ampleksas pli ol mil unuojn. Pro siaj verkoj Blanke ricevis plurajn premiojn, inter aliaj la Eugen-Wüster-Medalon kaj la estonan premion Academicus Paul Ariste. Al UEA Blanke servis kiel Komitatano tra du jardekoj (1978-98) kaj kiel membro de diversaj komisionoj kaj laborgrupoj. Krome, Blanke estis elektita honora membro de UEA en 2011.

*Laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 632 (2016-08-23).*

---

# Premioj de Fondaĵo Antoni Grabowski

La Fondaĵo Antoni Grabowski estis kreita en 1988 sur la bazo de grandanima donaco de Adam Goralski (1912-2005). La ĵurio de la fondaĵo, kiu konsistas el Ulrich Lins, Shi Chengtai kaj István Ertl, aljuĝas premiojn meze ĉiun duan aŭ trian jaron. En la Nitra UK estis anoncitaj la ĉi-jaraj premiitoj: La unua premio (700 usonaj dolaroj) iris al Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer por ilia komuna verko Historio de la Esperanta literaturo. Hispana Esperanto-Federacio ricevis la duan premion (300 usonaj dolaroj) pro Bitoteko, per kiu elstaraj verkoj estas senpage alireblaj. Premio de 150 us.dolaroj estis donita al Jean Codjo, beninano vivanta en Kanado, kiu valore kontribuis al la Esperanta literaturo per rakontoj riĉigantaj la interkulturan dialogon.

*Laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 633 (2016-08-24).*

---

# IJK 2017 en Togolando!

La Estraro de TEJO decidis, ke la 73-a Internacia Junulara Kongreso de UEA okazos en Areno, urbo en la sudoriento de Togolando tuj apud Atlantiko. La urbo situas lime de Benino kaj 45 kilometrojn for de la ĉefurbo Lomé. La kongreso okazos de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto, kio donas al entuziasmaj kongresfrekventantoj ripozajn tagojn post la Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Seulo de la 22-a ĝis la 29-a de julio. Nepre trafu tiun ŝancon kunligi esperantumadon kun admirado de tiu bela kaj interesa lando.

*Laŭ komuniko sur la retejo de TEJO.*

---

**Unustilaj Informiloj de TEJO disponeblas en [tejo.org](tejo.org)**

TEJO en 2012 kreis la Unustilan Informilon por pli bone atingi gejunulojn. La flugfolioj, kiuj prezentas resumajn informojn pri Esperanto, pri TEJO kaj kontaktebloj de Landaj Sekcioj, nun aperas en 9 novaj lingvoj: la arpitana, ĉeĥa, dana, kataluna, hispana, piemonta, slovena, ukraina kaj vjetnama. Ni dankas al Marta Pieczarka pro la altkvalita grafikaĵo kaj enpaĝiga laboro kaj al ĉiuj kiuj ankaū volontule tradukis kaj reviziis la informilojn.

Se vi deziras kunlabori pri tradukado kaj revizio de la Unustilaj Informiloj al aliaj lingvoj, skribu al informado@tejo.org

**32-a ARKONES okazos en Poznán (23a-25a de septembro)**

Por kulturemaj Esperantistoj temas pri la plej grava aranĝo de la jaro: Jam por la 32-a fojo ĉi-septembre okazos en Poznano la ARtaj KONfrontoj en ESperanto. Aparte bonvenaj estos junaj partoprenantoj, kiuj aliĝos kun 20%-a rabato. Membroj de Pola Esperanto-Junularo partoprenos senpage, kondiĉe de aliĝo antaŭ la 15-a de septembro. Aparta avantaĝo estas la facila atingeblo de Poznano: Flugbiletoj estas akireblaj jam ekde kelkaj eŭroj. Atendos vin steluloj de la Esperanto-kulturo, inter aliaj Fratoj Slezak, Mikaelo Bronŝtejn kaj Tomio Frejarö, membro de La Perdita Generacio. Pliaj informoj ĉe: http://www.arkones.org.

---

# Nova kajero de Kontakto




Aperis nova numero de “Kontakto”. Ĉi-numere atendas vin aparte akuala kovrila temo: “Kien iras la religioj?”. En la kovrila artikolo Emmanuel Wald, doktora studento pri protestanta teologio kaj religiaj sciencoj, el multaj perspektivoj prilumas la rolon, kiun religioj estonte ludos en malfrumoderna socio. Okaze de la publikigo de sia nova albumo “jOmO okcitanas”, jOmO gastas en la intervjua rubriko kaj rakontas interalie pri la estiĝo de “okcitanas”. En sia artikolo “Orlando, samseksemo kaj religio”, Marcos Kramer analizas la teruran amaspafadon en samseksemula diskejo en Orlando. Ensalutinte en uea.org, vi povas elŝuti la numeron ĉe: http://uea.org/l/?prenu=kto3_16.

---

# Estraro de UEA elektita

En sia unua kunsido kadre de la 101-a Universala Kongreso, la Komitato de UEA en granda unuanimeco faris la oficajn elektojn. Krom la nova estraro estis elektitaj komitataj revizientoj (Ans Bakker-ten Hagen kun 39 voĉoj kaj Flory Witdoeckt kun 40 voĉoj) kaj la membroj de la Komisionoj pri Statutoj de la Landaj kaj Fakaj Asocioj (Mireille Grosjean kun 38 voĉoj, Ulrich Lins kun 38 voĉoj kaj Brian Moon kun 41 voĉoj) kaj pri financoj, en kiu estas du TEJO-membroj. Al siaj postenoj reelektitaj

estis la Prezidanto de UEA, Mark Fettes (36 por), la Vicprezidanto de UEA, Stefan MacGill (39 por), kaj la Ĝenerala Sekretario de UEA, Martin Schäffer (35 voĉoj por). Legu la vivresumetojn de la novaj estraranoj en ĉi-tiu komuniko kaj iliajn respondecojn ĉi-tie. Alelektita al la nova estraro estis Maria Rosaria Spanó, kiu okupiĝos pri la kerna agadkampo de eksteraj rilatoj.

*Laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 628 (2016-07-25), N-ro 631 (2016-08-20).*

---

---

# Venontaj renkontiĝoj

**9 - 11. septembro**

4-a Esperanto sur la strando - en Gdansk-Sopot, Pollando. Krom la turisma kaj socia programo, ĉi jare renkontiĝo dediĉita al historio de plej fama triptiko de Hans Memling "Lasta Juĝo". Inf.: Triurba Esperantista Asocio TORENTO, PL- 81-824 SOPOT, str. Armii Krajowej 94, Pollando. Rete:torentosopot@wp.pl

**9 - 11. septembro**

Moskva Esperanto-Renkontiĝo, MER-6 - en Moskva regiono, Rusio. - MER estas interplektiĝo de la iama SEJT-etoso kaj la nova vento de Esperanto-movado. Seriozaj prelegoj kaj prezentadoj alternas kun kantado, ŝercado kaj babilado pri la interesaĵoj en la varma amika rondo. Ni ĉiuj havas kion diri aŭ kanti unu al la alia. Ni uzas nur Esperanton, sendepende ĉu estas iu oficiala programero aŭ distra interparolo. Por ni tio estas nature, ĉar ni ĉiuj kune estas Esperanto-kulturo. Dum MER ne eblas enui, ĉar por tio absolute mankas la tempo! - Kiel aldona agrablaĵo kadre de la aranĝo okazos esperantologia konferenco kun Esperanto kiel laborlingvo, oficiala konferenco de Rusia Universitato de Amikeco de Popoloj (RUDN). Inf.: Dima Ŝevĉenko, retumanto@gmail.com

**10. septembro**

8-a E-mentala pikniko - en Krupka, Ĉehio. Ekskurso tra belega regiono kun bunta pikniko. Inf.: E-mental´ e-mentalprago(ĉe)seznam.cz

**11. septembro**

15-a Esperanta Renkontiĝo - en Rio-de-Ĵanejro, Brazilo. Temo:"Esperanto dá Liga". En la programo estos prelego de Fernando Maia, muzika prezentado de Alexandre Sankor, skeĉo, omaĝo al Zamenhof, artaj videoj, lotado de libroj, kd-oj, inter aliaj memoraĵoj, bongusta lunĉo, ktp. Inf: Esperanto-grupo Lázaro Luiz Zamenhof, Strato Sapopemba 1020, domo 46, kvartalo Bento Ribeiro.
Rete: contato@lazaroluizzamenhof.com.br

**14 - 23. septembro**

49-a Internacia Esperanto-Feriado - en Duszniki Zdrój, Pollando. Inf.: Silezia Esperanto Asocio, rete: pomer@wp.pl

**16 - 18. septembro**

Nord-Okcidenta Esperanto-Konferenco - en: Anaco Bay Inn 916 33rd Street, Anacortes 1-877-299-3320 (7atm ĝis 10ptm PHZ), Usono. Jara kultura festivalo por geesperantistoj de Kaskadio, la norda Pacifika marbordo de Norda Ameriko, Alasko

al norda Kalifornio. Inf.: NOREK - Nord-Okcidenta Esperanto-Konferenco norek2016@morsekob.org

**16 - 18. septembro**

14a Renkontiĝo de verkistoj kaj tradukistoj - en Hraščina, Kroatio. Esperantlingvaj verkistoj kaj tradukistoj renkontiĝas kaj renkontas sian publikon por prezenti novajn librojn. Inf.: Kroata Esperanto-Ligo, Zagreb, Kneza Mislava 11. Kroatio. Rete: spomenka.stimec@zg.t-com.hr

**16 - 18. septembro**

9-a SFERO (Svisa Feria kaj Familia Esperanto-Renkontiĝo) - apud Villers le Lac, Francio. La aranĝo celas kunigi kaj familiojn, kiuj uzas esperanton hejme, kaj homojn, kiuj ŝatas la familian etoson. Kune, ni ĝuos grupan semajnfinon, dum kiu ni ludos, promenos, kuiros, babilos... Inf.: SES, Esperanto, case postale 9, CH-2416 Les Brenets, Svisio. Rete: ses @ esperanto.ch

**16 - 19. septembro**

Beneluksa Kongreso 2016 - en Lier, Belgio. Varia programo kun kursoj kaj prelegoj en ĉarma urbeto Lier atendas vin! Inf.: Flandra Esperanto-Ligonicky24@telenet.be

**17. septembro**

Renkontiĝo de Esperanto-Verkistoj - en Kroatio. Inf.: Spomenka Ŝtimec, rete: spomenka.stimec@zg.t-com.hr

**18. septembro**

19-a Esperanto-Renkontiĝo de Taguatinga - en Taguatinga, Braziljo, BRAZILO. La temo de la unutaga aranĝo estos "Esperanto kaj Oomoto". Inf.: Taguatinga Esperanto-Klubo, C 12, Edifício Paranoá Center, sala 112, Taguatinga (Centro) - Brasília (DF) - CEP BR-72010-120. Rete:taguatek@gmail.com

**23 - 25. septembro**

32-a ARtaj KONfrontoj en ESperanto - en Poznań, Pollando. Sendependa kultura kaj arta esperantista aranĝo. Inf.: tobiasz@esenco.org

**24 - 25. septembro**

Aŭtunaj tagoj - en Taivalkoski, Finnlando. - Inf.: Tiina Oittinen, rete: tiina.oittinen@pp.inet.fi

**29. septembro - 2. oktobro**

MKR - MontKabana Renkontiĝo - en Isola Santa, Tuskanio, Italio. La aranĝo por montmigrantoj kaj naturemuloj! Inf.: Enrico Gaetano Borrello, rete: enrico.gi.bi(ĉe)virgilio.it

**30. septembro - 3. oktobro**

16-a KoKoLoRES - Kafoklaĉo kaj Ludoj dum REnkontiĝo Semajnfina - en Schwerte, Ruhr-regiono, Germanio. LA aranĝo por ludemuloj, sed ne nur, laŭbezone okazos kurso por komencantoj. Inf.: Petra Dückershoff, rete: petra.dueckershoff(ĉe)esperanto.de

**30. septembro - 3. oktobro**

TORPEDo 11 - en Herzberg am Harz, Germanio. TORPEDo 11: Pedagogiaj Tagoj, 75a Studsesio: studmodulo pri didaktiko, metodiko, instrukapabliga trejnado. Inf.:

Interkultura Centro Herzberg, klerigejo de GEA, DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, Germanio. Rete: esperanto-zentrum@web.de

Informiĝu pri pliaj renkontiĝoj ĉe: http://www.eventoj.hu

rigardu pli ĉe tejo.org

## Kolofono

TEJO-aktuale estas retpoŝta informilo de TEJO.

TEJO-aktuale estas senpage abonebla, aperas 2-semajnritme kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj. Por publikigi vian anoncon retmesaĝu al tejo-aktuale@tejo.org.

Oficiala retpaĝo de TEJO-aktuale: tejo.org/tejo-aktuale

Redaktoro: Jan Kozousek, Aŭstrio, jan.kozek@icloud.com

Eldonas: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), http://www.tejo.org

Limdatoj por kontribuoj: dimanĉo antaŭ la apero

Retpoŝta abono: http://uea.org/via/retlistoj

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands

mailchimp